


INTERLANGUAGE



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

**"PEOPLES SPEAKING TO
PEOPLES"**

**A WORLD INTERLANGUAGE
NEEDED**

**ESPERANTO SOLVES THE
PROBLEM**

AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la
ESPERANTO-ASOCIO
de NORD-AMERIKO*

MAY 1951

Twenty-five Cents

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

Vol. 65

114 West 16th Street

No. 5

New York 11,

N. Y.

Associate Editors: Dr. W. Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. Norman McQuown, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Howard E. Latham, Myron Mychajliw.

Sustaining Board: Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, Olive Campbell, J.F. Clewe, Preston Davis, Jr., E.G. Dodge, R.E. Dooley, Harold Ewen, Dr. G.P. Ferree, Anonymous, Thomas Goldman, George Hirsch, H. F. Keller, Eulalia Marks, Tony Nabby, R. C. Palmer, D. B. Richardson, Tom Robbins, Beatrice Ruff, Mazah Schulz, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Isabel Snelgrove, Francis H. Sumner, Adeline Vigelis, Anonima.

Office Assistants: Lola Mae Muse, H. S. Harris.

KON-TIKI

By THOR HEYERDAHL

The greatest true adventure story ever! Now available in Esperanto. 6 modern Norsemen cross the Pacific on a 40-foot raft to unravel a 1000-year-old mystery. From first gripping page to last, you will say it's wonderful. The Esperanto edition has been translated in vivid, flowing style, retaining all the wry good humor and exciting adventure. With 80 photographs. Bound in blue cloth, stamped in gold.

\$3.90 Postpaid



Enjoy reading this exciting best seller today! Order from:

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Jarabono eksterlande, \$1.50 por kalendara jaro

Make Checks Payable to Esperanto Association of North America

Minimum Membership in E.A.N.A.—\$3.00 per Year

Active Sustaining Membership — \$5.00 per Year

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 65

MAY 1951

No. 5

Esperanto for Scientific Dictionaries

UNESCO Publications Show Important Uses of Interlanguage

THE extent to which Esperanto has already been included in interlingual scientific and technical dictionaries as well as the significant role which it can play as a "bridge language" for the correlation of terminologies in many languages are strikingly evidenced in two recent publications of the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization (UNESCO). They are: *Report on Interlingual Scientific and Technical Dictionaries* and *Bibliography of Interlingual Scientific and Technical Dictionaries*, both by J.E. Holmstrom, Ph. D.

The *Report* is a thoroughly revised edition of a study which Dr. Holmstrom prepared for UNESCO before joining the staff of its Secretariat in Paris. It was issued in mimeographed form for a limited circle of readers in July 1949. A review of the first edition appeared in this magazine in May-July 1950 under the title, A "Bridge Language" for Scientific Use.

In the new edition the possible use of Esperanto is discussed on page 20. The "bridge language", Dr. Holmstrom states, "might be Esperanto which being artificial and neutral would avoid national jealousies, enable valuable help to be counted on from the *Internacia Scienca Asocio Esperantista*, and offer other advantages. Esperanto grammar is so simple that once its vocabulary was diffused in this way, actual texts would appear merely as filling in between the key words found in the dictionary and would be readily understood. Wüster (Dr. Eugen Wüster) mentions a suggestion from Japan that expressions occurring in scientific texts which it was important to understand accurately should be followed by their standardized Esperanto equivalents in brackets, as is done with Latin names of botanical species."

The *Bibliography* lists 1044 dictionaries covering a total of 46 languages. 74 of the dictionaries listed contain Esperanto terminologies or translations. 61 of these are quoted from a study by Dr. W. Solzbacher, *Technical Vocabularies in Esperanto—A Critical Study and Survey*, published in July 1949 as a special issue of the *American Esperanto Magazine*. Dr. Holmstrom gives credit to Dr. Solzbacher and this magazine as well as to other sources used.

Dr. Holmstrom's bibliography is, of course, by no means complete, neither for Esperanto nor for the other languages. It contains, how-

ever, several important vocabularies using Esperanto which Dr. Solzbacher overlooked, in particular: a meteorological vocabulary (*Lexique Météorologique*) in French, English, Spanish, German, Italian, Portuguese, Russian, Polish, Czech, Croatian, Rumanian, and Esperanto, by *Emile Delcambre and Rollet de l'Isle*, Paris, 1931; a Radio Technical Vocabulary (*Vocabulaire de Radiotechnique*) in French, English, Spanish, Italian, German, and Esperanto, by *Michel Adam*, Paris, 1940; a polyglot collection of postal terms (*Recueil Polyglotte des Expressions Postales*) in French, German, English, Spanish, Italian, Russian, Swedish, Finnish, and Esperanto, by *John Wirkberg*, Helsinki, Finland, 1924.

Dr. Holmstrom's bibliography gives the reader an excellent idea of how vast the field is, what has been done so far, and what remains to be done. Publications are listed in accordance with the Universal Decimal Classification (UDC) system. There are carefully prepared indices according to language (listings under "Esperanto" are quite impressive), subject matter, and authors' names.

Everyone interested in the vital problem of interlingual scientific and technical dictionaries owes a real debt of gratitude to Dr. Holmstrom and to UNESCO for these significant publications.

AVAILABLE FROM THE ESPERANTO BOOK SERVICE

Report on Interlingual Scientific & Technical Dictionaries , Dr. J.E. Holmstrom, UNESCO publication, 35 pp.....	\$.40
Bibliography , Dr. J.E. Holmstrom, UNESCO publication, 223 pp. .85	
Technical Vocabularies in Esperanto , Dr. W. Solzbacher. A critical study and survey, 24 pp.....	.35
Vortaro Pri Lumigscienco in Dutch, German, English, French, and Esperanto, large format, 154 pp.....	2.75
Maŝinfaka Esperanto-Vortaro , E. Wuster. Esp-Ger & Ger-Esp. .35	
Segil-Vortaro (Dictionary of Saws), in Esperanto, German, English, French, and Italian, 32pp.....	.35
Homaj Rasoj de la Mondo , Nordenstreng, 140 il., 212 pp....	1.25
La Mistero de l'Sango , Battaglia (Jung). A book on the technique of geneological research, 19 full page il., 155 pp., bound....	.85
Filatela Terminaro , H.M. Scott, 47 pp.....	.25
Marista Terminaro , Kom. Clissold. Index in Esperanto, English, French, German, Spanish, 62 pp.....	.35
Muzika Terminaro , Butler & Merrick, 35 pp.....	.25
Leĝa Terminaro , Mildwurf, 11 pp.....	.25
Vocabulaire Electrotechnique International (International Electro-Technical Vocabulary), in French, English, German, Italian, Spanish, and Esperanto, photo-offset reprint, 311 pp.....	To order

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.



The National Education Association in Washington recently published the third printing of Personal Growth Leaflet Number 183, *Esperanto—The World Interlanguage*, making a total of 60,000 copies.

In Western Germany, for the benefit of the traveling public, especially foreigners, the addresses of Esperanto delegates, clubs, etc., are posted at 244 railroad stations.

At The Hague, seat of the Dutch Government, the city administration has decided to name a centrally located street after Dr. L.L. Zamenhof, author of Esperanto.

In Brazil and Argentina, the Very Reverend Dr. J.B. Se-Tsien Kao, O.F.M., former Director of the Education Department of the Chinese Catholic Central Bureau in Shanghai, recently delivered numerous lectures in and about Esperanto.

Japanese scientific publications in Esperanto appear at a rapid pace. One of the latest deals with the theories and accomplishments of *Professor Hideki Yukawa*, Nobel Prize winner in Physics for 1949.

The Swedish Parliament, as in past years, again granted a subsidy of 5,000 kroner for the organization of Esperanto courses for public school teachers in the summer period.

In Zaandam, Netherlands, a daily newspaper, *De Typhoon*, recently sponsored Esperanto classes for its readers. About 300 enrolled.

In Israel, a new Esperanto textbook in Hebrew was published recently. *Rabbi D.I. Rabinovitz-Teitz*, *N.Z. Maimon*, and *Chaim Chavkin* are the authors.

This Year's Universal Esperanto Congress, at Munich, Germany, August 4–11, promises to be a great success. Next year's Congress will be held at Oslo, Norway.

An International Commission on "Esperanto and Sociology" is being established to promote the use of Esperanto in sociological research and in the exchange of information on social legislation, etc. *Dr. William Solzbacher*, President of the Esperanto Association of North America, has accepted the temporary chairmanship of the Commission. The Secretary is *S-ro C.J. Keur*, an official in the Netherlands Ministry of Social Welfare. Inquiries should be addressed to him at *Moerweg 76, The Hague, Netherlands*.

SUKCESOJ EN LA KAMPANJO POR VARBI MEMBRŬJN

Kvankam la Kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron" ne donis tiajn rezultojn, kiajn ni esperis, tamen dank' al fervora agado de kelkaj aktivuloj, EANA pligrandiĝis je iom da novaj membroj. Jen la daŭriga listo de varbintoj: *Angela Alfaroli (4)*, *W. Raines (2)*, *D. R. Broadribb*, *Esperanto-Klubo de Fitchburg*, *W. Vathis*, *J. Dubin*, *Frato Long*, *S-ino M. J. Brady*, *T. Robbins*, *Eulalia Marks*, ĉiuj po 1.



Ĝis nun, *S-ro Konrad Kail* el *Spencer, Iowa*, sukcesis varbi plej multe da membroj (entute 11), kaj en dua vico kun 4 novaj membroj staras *S-ino Angela Alfaroli* el *Vineland, N. J.* Estas interese konstati kiel ili venis al sukceso tiurilate. Plej bona maniero, ŝajne, estas kolekti kursanojn sub via gvidado kaj instrui ilin en Esperanto. Tion faris *S-ro Kail*, kaj post kelkaj monatoj de instruado, li instigis siajn kursanojn aliĝi al EANA.

S-ino Alfaroli provis alimaniere. Ŝi vizitis persone diversajn amikojn kaj konatulojn, kiuj iom interesiĝas pri Esperanto kaj persvadis ilin membriĝi al EANA por daŭre helpi la movadon. Same faris *S-ro A. Rogus* el *Passaic, N. J.* *S-ro G. W. Bailey, Jr.*, sukcesis varbi 3 novajn membrojn per persona kontakto, kaj preteco donaci el sia propra poŝo ekzemplerojn de la lernolibro *Esperanto: The World Interlanguage*. *S-ino M. J. Brady* el *Calgary, Kanado*, sukcesis per kapto de amikino kaj bofrato en sia reto! *Esperanto-Klubo de Fitchburg* varbis novan membron por la loka grupo, kaj tiel aldonas al EANA plian membron. Preskaŭ ĉiuj aliaj sukcesaj varbintoj per leteroj al redaktoroj, disdonado de PGL, aŭ personaj leteroj instigis interesulojn aliĝi al EANA. Al ĉiuj varbintoj ni sincere dankas, kaj ni invitas aliajn provi sian lertecon kaj kapablon varbi unu membron.



"AMERIKA ESPERANTISTO" EN PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ

Ni ĉiam emfazas kaj substrekas, ke publikaj legejoj estas plej konvena loko por atentigi multajn personojn pri Esperanto. Pasintjare preskaŭ 200 publikaj biblioteko ricevis la nord-amerikan gazeton *AE*, dank' al 34 de niaj individuaj membroj kaj grupoj, kiuj pagis por tiuj biblioteko.

Al antaŭa listo de donacintoj ni aldonas la nomojn de sekvantaj personoj kaj grupoj, kiuj konsentis pagi abonojn por pluraj biblioteko: *C. H. McKinney (10)*, *Thomas O'Neill (10)*, *Herbert Smart (10)*, *Hal Ewen (10)*, *Esperanto Societo de Detroit (10)*, *J. H. Furay (15)*, *Washington Esperanto-Klubo (10)*, *R. L. Davis (2)*, *L. K. Beecher (5)*. Al ĉiu donacinto ni sincere dankas pro la valora kaj grava kontribuo por nia propaganda laboro.

Ĉijare restas ankoraŭ proksimume cent gravaj biblioteko, kiuj atendas patronojn, kiuj pagos por ili abonon al *AE*. *Kiu helpos?*

The Esperanto Association of North America

EANA CONGRESS - SPENCER, IOWA

Order Your Congress Ticket Now, And . . .

Support your EANA Convention at Spencer, Iowa. Let's print a grand list of *Congress Members* in the *Annual Report* this year, and match the enthusiasm and effort of our good Spencer Esperantists. You can do this by sending your \$3 for a Congress Ticket now, and thus be enrolled at the Congress and in the *Annual Report* as a "Participant-by-Mail". You will receive illustrated literature on Spencer and the Congress.

FLASH! For "Participants-in-Person"! There is an opportunity for about three Esperantists in the East to *travel FREE in an airplane* from Columbus, Ohio, to Spencer, Friday the 29th. This same opportunity for *FREE AIR TAXI* is offered to West Coast Esperantists who return to California from Spencer after the Congress. Among latest "Participants-in-Person" is *Preston Davis, Jr.*, of Columbus, Ohio, who is making a trip in his airplane to California, with plans for stopping over to attend the Congress. This is a wonderful opportunity for about three California or West Coast Congress Members to have a delightful return trip for the asking. Likewise for Eastern Esperantists for an airplane ride from Columbus to Iowa. *Just write the Central Office immediately, if you are interested.* However, let's not limit the Congress to those who are going by airplane - let's join them in train, bus, auto, or what have you?

The Spencer Esperantists are really doing their utmost to make this 1951 Congress a pleasurable affair. Write early for reservations. And for those who cannot attend in person, make sure to join this happy occasion as a "Participant-by-Mail" *by sending your \$3 at once for your Congress Ticket.* You will thereby render great aid to your Congress Committee.

COMMENTS ON THE NEW FORMAT OF A.E.

"Congratulations on the Varityper and the job on the latest *AE Magazine!*" - *F. H. Sumner*

"The print of the January-February number of *American Esperanto Magazine* is a fine appearing job. I like it." - *Daisy Hopkins*

"A compliment on the quality of the issues of *AE*. Content, of course, is somewhat different from the past, but still in its way up to your high standard; and the Varityper-offset job is really excellent." - *Preston Davis, Jr.*

ESPERANTO - KRONIKO

Populara Radio-Programo "Hits & Misses", de la stacio WCBS en New York, faris je la 4a de Majo, 30-minutan prezentadon pri Esperanto. *F-ino Mary Marrett*, *S-ino Lola Mae Muse* kaj *S-ino Doris T. Connor* (la "Misses") estis gastoj de *Harry Marble*, konata anoncisto. Jen gaje, jen serioze, jen bonhumore, ili raportis pri Esperanto kaj ĝia utileco. Ĉiu sinjorino devis ne nur lerte paroli kaj gajni adeptojn por Esperanto, sed ŝi ankaŭ devis lerte respondi demandojn pri historio, scienco kaj eĉ ĉevaloj por fari "trafojn" (hits) kaj tiel gajni monon. Sufiĉas por diri, ke niaj lertaj, spertaj, inteligentaj Esperantistinoj gajnis entute la sumon de \$50, de kiu 10% iris al la kaso de EANA, kiel rekta donaco de *F-ino Marrett*.

En Marymount College, Kansas, studentinoj en la filio *Beta Lambda* de la honora organizo *Eta Sigma Phi*, prezentis diskuton pri la bezono de internacia lingvo kaj ĝia solvo en Esperanto. *Fratulino Marie Antoinette*, estrino de la Fakoj pri Greka Lingvo, gvidis la diskuton. Partoprenis ses fraŭlinoj de la societo.

"Vivoplena afero estas la kunvenoj de Toronto Esperanto-Klubo sub gvidado de niaj viglaj Prezidanto kaj Sekretario (Sinjoroj Lambert kaj Hackett)," raportis *D.W.M. Jenkins* el Toronto. Nova samideanino en la Klubo estas *S-ino Nii*, el Tallin, Estonujo.

Esperanto-Rondo en New York, kiu kunvenas ĉiusemajne por konversacii Esperante, iniciatas novan kutimon. Unufoje ĉiumonate la grupo dediĉas monsumon kolektitan dum la kunveno al la Subtena Kaso de EANA. Kvankam la sumo ne estas ĉiam granda, la intenco meritas aplaŭdon kaj dankon.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), estas la tutmonda organizo de la Katolika Esperanto-movado. Tiu organizo priatentas Katolikajn aferojn en Esperanto. Katolikaj Esperantistoj, kiuj deziras partopreni en IKUE estas petataj skribi al *S-ro Peter Golobiĉ*, R.D. 2, Medina, Ohio, kiu estas nomita peranto por Usono kaj Kanado. Oni skribu prefere en Esperanto, sed li komprenas iom ankaŭ la anglan lingvon. Oni povas ankaŭ aboni la gazeton *Espero Katolika* pere de la *Centra Oficejo de EANA*. Jarabono \$1.50.

Esperanto en la gazetaro: En *World Airways Teacher*, Jan-Feb., eldono de Pan American Airways, estis cititaj argumentoj por Esperanto en interesa artikolo titolita "What Idioma Govoritie Vous, Hsien-Sheng?" – Longa artikolo de *S-ino Cecelia Thomas* pri "Kio estas la lingvo Esperanto" aperis en Februaro en *The Guide*, gazeteto de Portland, Oregon. – Pli bone malfrue ol neniam, ni mencias bonan artikolon de *S-ro W.P. Vathis* sub titolo "Esperanto Proponata en UNESCO Rezolucio", kiu aperis en Decembro en *The Denver Post*.

Ĉ INTERNACIA KOMISIONO POR VIRIN-RAJTOJ

ĈU vi scias, ke en 16 landoj de la mondo virinoj ne povas voĉdoni en politikaj elektoj? Ĉu vi scias, ke inter ili estas 5 amerikaj landoj (Kolombio, Haitio, Honduraso, Nikaragvo, Paragvajo) kaj 2 eŭropaj landoj (Svisujo kaj Liechtenstein)? Tiu fakto aperas en la raportoj diskutitaj en la kvina kunsido de la Komisiono pri la Stato de Virinoj. La kunsido komencigis en New York la 30an de Aprilo.

La Komisiono, kiu funkcias sub la aŭtoritato de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de la Unuigitaj Nacioj, konsistas el reprezentantoj de Aŭstralio, Britujo, Ĉinujo, Dominikana Respubliko, Francujo, Grekujo, Haitio, Hindujo, Kubo, Libanono, Meksiko, Nederlando, Polujo, Sovetujo, kaj Usono. Laŭ raporto pri la politikaj rajtoj de virinoj en la tuta mondo la situacio nun estas jena:

En 56 landoj (inter ili kompreneble Usono kaj Kanado) virinoj partoprenas en politikaj elektoj egalrajte kun viroj. En 3 landoj – Gvatemalo, Portugalujo, Sirio – virinoj devas plenumi specialajn kondiĉojn por povi voĉdoni. En 5 landoj – Bolivio, Grekujo, Meksiko, Monako, Peruo – virinoj voĉdonas nur en *lokaj*, ne en *naciaj* elektoj. En Grekujo, ĝis la jaro 1953, virino devas esti 25-jara por havi la voĉdonrajton, dum viro ricevas ĝin je la 21a naskotago. En Peruo virino ricevas la rajton, kiam ŝi fariĝas 21-jara, viro, kiam li estas 18-jara.

Virinoj ne rajtas partopreni elektojn en 16 landoj: Afganujo, Kolombio, Egiptujo, Etiopio, Honduraso, Irano, Irako, Jemeno, Haitio, Jordano, Libanono, Liechtenstein, Nikaragvo (kie virinoj ne povas voĉdoni, sed povas esti elektataj al diversaj publikaj oficoj), Paragvajo, Saŭdi-Arabujo, Svisujo. En tri el tiuj landoj – Etiopio, Jemeno, Saŭdi-Arabujo – neniu elektoj okazas, do nek viroj nek virinoj havas voĉdonrajton.

Kun la raporto, en kiu aperas tiuj faktoj, la Komisiono diskutis proponon de rezolucio, laŭ kiu, ĉie en la mondo virinoj devus esti politike egalrajtaj kun viroj.

– el *United Nations Bulletin*, 1 Majo 1951



Letero el Koreo: "Mia fido al la justeco kaj mia volo de la vivo pli kaj pli fortiĝas, ricevante leterojn kaj kuraĝigojn de la enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj. Ju pli suferas nia lando kaj la homaro kaŭze de la senhomecaj komunistoj kaj Kremlinanoj, des pli fortiĝas mia volo vivi... Mi volas travivi la suferojn, por ke mi povu sperti ilin kaj sciigu al la popolo, ke ni elektu la *vere justan vojon* por iri kaj krei pacan mondon.

"Mi planas eldoni novan gazeteton, kiu nomiĝos *Ariran*, titolo de fama popolkanto de nia lando. Mi volas priskribi la faktojn, kiuj okazadas en nia lando, speciale la fakton, kion la komunistoj faris en nia lando, la suferojn kaj klopodojn de la popolo de nia lando.

Kun Esperantista saluto, L. HAJPIN, Busan, Koreo."



DEZIRAS KORESPONDI



Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Brazilo. H. Georg, Rua Conselheiro Candido de Oliveira 124, Vila Anastacio, São Paulo. 44-jara fraŭlo, hungara esperantisto, serĉas ĉarman, entuziasman samideaninon pri interkorespondado, kiu same serĉas la okazon, kun kiu post reciproka ekplaĉo estu ebla fari esperantistan geedziĝon. (Afero serioza).

Bulgarujo. C. Bajraktarov, garo Dobrodan. Juna fraŭlo dez. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. PM kaj PK. Nepe respondos.

Bulgarujo. F-ino Nina Kamenova, st. "Rakovska" 2, Russe. Dez. kor., interŝanĝos PM, il. PK.

Cekoslovakujo. Miloslav Šinkora, Příběnická 738, Tábor. Korespondus per afrankitaj poŝtkartoj.

Hispanujo. S-ro J. Tuset, Apartado 70, Manresa (Barcelona). Dez. kor. letere aŭ poŝtkarte kun Usonaj gesamideanoj. Certe respondos.

Usono. William P. Raines, 558 Grand Avenue, Astoria, Oregon. Dez. kor. kun novaj Esp-istoj de Usono kaj Esp-istoj de Italujo.

Usono. N.R. Garnes, c/o Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y., petas, ke Gertrud Broda, Vieno, Aŭstrujo, skribu al li.



Ekspedicio Kon-Tiki, Thor Heyerdahl.

Tradukita el la norvega lingvo de Carsten Brynildsen. 208 paĝoj plus 28 paĝoj da bildoj. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1951. Tolbindita. Havebla de EANA, \$3.90.

Multe leginte pri la anglalingva eldono de *Kon-Tiki*, mi tre scivole eklegis la belan bluan esperantan libron. La ora surpriso kaj multaj ilustraĵoj allogis eĉ min, kiu kutime "ne ŝatas vojaĝrakontojn". Ĉi tio estas la plej malkutima verko, kiun mi ĝis nun legis en iu lingvo. Priskribante sciencan ekspedicion trans la Pacifikon, Heyerdahl sukcesas alkateni la atenton de la leganto tra ĉiu paragrafo ĝis la lasta vorto.

Por pruvi ke legendoj pri *Kon-Tiki*, filo de la sundio, estis efektivaj faktoj (pli malpli), kiuj klarigas la similecon inter la lingvoj kaj kulturoj de malnovaj popoloj de Peruo kaj la pacifikinsuloj, Heyerdahl kaj ses aliaj viroj entreprenis vojaĝi sur flosa konstruita laŭ la antikva perua sistemo, trans la oceanon pacifikan. Dum la preparado kaj vojaĝo, lingvaj malfaciloj, vizitemaj fiŝoj, flugantaj cefalopodoj, ktp., kaj fine festoj en Havajo, estis nur kelkaj el la spertoj mirinde bele priskribitaj.

Kostante malpli ol la anglalingva eldono, la libro estas tutcerte la plej aĉetinda esperanta libro aperinta post la dua mondmilito.

— Donald R. Broadribb

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity.

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. Brief course of 64 pages25c
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy Kellerman-Reed. Very complete beginner's text for self or classes, giving extensive examples, dialogue, etc. Offset reprint, with some pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with index. Original price 75c, reduced to less than half-price35c
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 entertaining illustrations for rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto with pictures. 160 pp.30c
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "Six-books-in-one": history, textbook, reader, world directory, and two dictionaries. All in one volume. 245 pp.Paper \$1.50; Cloth	\$3.00
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, Dr. Benson. A rare wonder-book with 11,000 pictures, all-Esperanto, 560 pp.Cloth	\$6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed analysis of Esperanto grammar, with examples. 371 pp.Cloth	\$1.50
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> . 663 pp.Cloth	\$6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's little pocket companion. Offset ed. 80 pp.25c
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Complete, in concise form. The very best small dictionary. 288 pp.Cloth	.85c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj al la Universala Vortaro de la Lingva Komitato". 490 pp.Cloth	\$2.60
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Latest edition including appendices of proper names and neologisms. Each meaning listed individually. 348 pp.Cloth	\$2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO Zamenhof and others. Model chrestomathy and literary guide. 472 pp.Paper bound	1.50
Rare ed., ptd 1924, royal blue cloth with gold	Cloth bound 2.50
KARLO, Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo from boyhood to marriage. 43 pp.25c
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Bound in blue, art vellum, 8vo, 996 pp.Cloth	\$2.00
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Aerobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42pp; <i>Lando de Argentia Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, <i>Thais</i> , by Anatole France, (2-in-1) 66pp; <i>Rozaŭo Ĉiumiljara</i> , miracle of love, 48 pp. Each book 25c. Entire sortimento for only	\$1.00
INDIAN BEAD STARS. White ground, green star in center85c
GREEN STARS. White ground, gold trim, brooch or button50c

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

GOOD BOOKS FOR YOUR SUMMER READING

Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo, Selection of articles published by the official Brazilian National Council of Geography. Beautiful volume on the life, customs, and country of Brazil (the Amazon, jungles, gauchos, natives, wondrous plants, etc.). 37 full-page art engravings, 152 pp. leatherette bound...\$4.00

Ce la Sanktaj Akvoj, by J.C.Heer. An interesting novel, picturing the life of villagers in the Swiss Alps, under the constant threat of an avalanche. Parts I & II in one volume, half-cloth bound, illustrated cover, 216 pp.\$2.00

Du Amsentaj Noveloj, "Imenlago" by Theodor Storm, and "Maruška" by Escherich. Two famous stories60¢

Inter Sudo kaj Nordo, by Ferenc Szilagyi. Excellent short stories, novelettes, commentaries on present day events. Bound in grey-simulated-cloth effect, 180 pp.\$1.85

Ora Libro de la Esperanto Movado, 1887-1937. A wealth of information with entire background of the Esperanto movement. Richly illustrated, paper cover.....\$1.40

Populara Lernolibro de Esperanto, by L. Kokeny. Easy, graded reader, with questions after each topic50¢

Dante: Infero, famed translation by Kalocsay of the Divine Comedy. Esperanto literary treasure. Card cover.....\$2.00

Svisa Antologio, ed. by Arthur Baur The best of Swiss literature from all four groups (German, French, Italian, Romansch). Paper edition, 540 pp. \$4.00

Rare Collection of 25 Keys, (25 languages with Esperanto): Albana, Angla-Esp, Esp-Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudaŝrika, Sveda. Complete for.....\$2.75

Jarmiloj Pasas, Haefker. History of the world, written in Esperanto. 4 books in 1 vol. Deluxe bound, 500 pp.\$3.65

Al Altaro de Dio, Thalmaier. Catholic prayer-book in Esperanto. Paper edition, 43 pp.35¢

La Ĝoja Podio, by Raymond Schwartz. A medley of good humored poems, articles, lectures, playlets, with the Latin Quarter flavor. Cloth-bound, 271 pp.\$1.40

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.